

# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Oktobro 2003

MENSUEL/MONATA

74-a jaro, n-ro 10 (1180)

ISSN 1163.0442

*\*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem\**

5 €

<http://www.sat-esperanto.org/> \*\*\* retadreso: [satesper@noos.fr](mailto:satesper@noos.fr)

## SAINT DENIS

*ĉefa loko de la Eŭropa Socia Forumo*



*Eŭropa Socia Forumo okazos de la 12.-15.11.2003 en St. Denis, Paris, Bobigny kaj Ivry.*

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

**El la redakto...**

Karaj,  
kiel mi  
jam anoncis en la  
septembra Sen-  
naciulo, la detala  
protokolo pri la  
kongresaj laboroj  
okupas preskaŭ  
komplete tiun ĉi



numeron. Krom tio vi havas kelkajn  
informojn pri nia partopreno en ESF,  
kaj pri nia venontjara kongreso.

Mi atentigas vin ke la no-  
vembra Sennaciulo verŝajne aperos  
iom malfrue pro mia vojaĝo al  
Japanio inter la 6-a kaj la 30-a de  
oktobro kie mi estos gasto de japana  
SAT.

Dum tiu periodo viajn  
kontribuojn bonvolu sendi al  
la adreso **de k-do Schram** kiu  
kolektos tiun materialon (rete:  
**Quiada@pandora.be**).

Dankon pro via kompre-  
nemo.

Elkore via,

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj  
redakto: 67, avenue Gambetta, FR-75020  
Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiiilo:  
+33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesper@noos.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30;  
de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster  
la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G.  
Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la  
redakto.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la  
aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni  
ne resendadas. La limdato de ricevo de manus-  
kriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

\*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205  
Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques  
SCHRAM

Abonnement annuel/jara abono France  
55€

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de  
nia peranto a° de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuoj estas  
ĉiam la 10-a en la monato.

**SAT ene de ESF**  
**ESF ene de SAT**

**EŬROPA SOCIALA FORUMO**

Kiel ni jam anoncis, SAT oficiale aliĝis al E.S.F. kaj aktive par-  
toprenos en ĝia disvolviĝo. Ni invitas ĉiujn SAT-anojn, ĉiujn pro-  
gresemajn esperantistojn, laŭpove veni al Parizo kaj partopreni  
al tiu evento. Jen kelkaj pliaj informoj:

\* SAT- kaj SAT-Amikaro havos komunan budon (la loko ne estas  
ankoraŭ konata sed ĝi troviĝos ĉu en Parizo (La Villette), ĉu en  
St. Denis. Tie ni povos ne nur proponi alternativon por interna-  
cia komunikado (Esperanton) sed ankaŭ niajn ideojn pri alia, pli  
homa kaj pli justa mondo.

\* Ni partoprenos al du manifestacioj :

- Inaŭgura manifestacio

- Ferma manifestacio

dum kiuj ni disdonos niajn flugfoliojn kaj marŝos kun niaj ban-  
deroloj.

Por efektiviĝi ĉion ni bezonas helpon kaj aktivan partoprenon de  
kiel eble plej da aktivuloj.

Detalaj informoj pri ĉio, regule aperos en niaj TTT-paĝoj, kiujn  
vi bonvolu regule konsulti per la adreso:

**<http://satesperanto.free.fr/esf/index.html>**

**S.A.T. OFICIALE ALIĜIS AL LA  
EŬROPA SOCIALA FORUMO (E.S.F.)**

**SAT-ANOJ KAJ AMIKOJ AKTIVU KUN NI !**



**Nova PIV aperis !**

**Akiru ĝin ĉe SAT.**

**Prezo: 70 € + afanko**

**Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €**

**ekster Eŭropo : 10,06 €**

**ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ**

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto  
en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple  
(Clar)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn  
tekstojn per la sistemo x (ĉ = ĉ, ŝ = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile trans-  
formi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere,  
vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

# PROTOKOLO

## *de la Laborkunsidoj de la 76-a SAT-kongreso*

### SOLENA MALFERMO

Solena malfermo de la kongreso okazis dimanĉe matene kun iom nekutima disvolviĝo. La kunvenon prezidis k-dino **Perla Martinelli** kaj sur la podio krom ŝi sidis k-doj **Jakvo Schram**, **Kreŝimir Barkoviĉ**, **Walter Zelazny** kaj kiel gasto s-ino **Berthet**.

Unue **Perla Martinelli** prezentis al la gekongresanoj la gastigurbon, ĝian evoluon kaj ĉefe la esperantistan flankon de Ĉaŭdefono kun KCE kaj CDELI. Ŝi transdonas la salutojn de la prezidanto de KCE kiu ne povis mem partopreni.

Sekve ŝi transdonas la vorton al la prezidanto de la P.K., k-do **Jakvo Schram**, kiu devas malfermi la kongreson. Li diris:

“Saluton karaj geomikoj,

Plejmultaj el vi scias, ke mi estas la nova prezidanto de la internacia Plenum-Komitato de SAT, almenaŭ tiuj k-doj kiuj legas “Sennaciulo”n, la monatan revuon de SAT.

Mi uzas la okazon danki tiujn gekamaradojn kiuj pozitive voĉdonis ĉu por aŭ kontraŭ la novaj anoj de nia Plenum-Komitato, ĉar mi estas certa ke ĉiuj voĉdonis kun la intenco helpi nian asocion.

Denove ni kunvenas por havi diskutojn pri nia asocio kaj la evoluo de la laboristaj luktoj, pri la Alternativa Tutmondismo kaj nia batalo por respekto de homaj kaj laboristaj rajtoj.

Bedaŭrinde pluraj ge-kdoj ne povas partopreni la eventon. Pluraj, pro la evidentaj kostoj de la kongreso kaj vojaĝo. Homoj kiuj vivas en mondoparto kie la valoro de mono malsamas de la regiono kie la SAT-Kongreso okazas. Por iam ŝanĝi tion la vojo estas longega kaj multaj bataloj devos okazi antaŭ ol ĉiuj homoj en la tuta mondo estos sufiĉe riĉaj por ke ili povu partopreni al internaciaj eventoj kiel nia SAT-kongreso.

Aliaj k-doj ne ĉeestas pro politikaj kialoj.

La potenculoj el la mondo parolas kun entuziasmo pri libera merkato kaj senlima komerco. Bedaŭrinde homoj daŭre ne estas liberaj. Homoj ankoraŭ ne senkatenigis sin de la naciaj potencoj kiuj devigas ilin peti permeson forlasi propran landon por viziti amikojn dum SAT-Kongreso en Svislando, imagu! Denove kelkaj amikoj (Grigorij) ne ricevis vizon kaj ne povas libere partopreni al nia Kongreso. Bedaŭrinde ankaŭ nia Sennacieca Asocio devas obei la malhumanajn leĝojn de la politika potenco, eĉ kiam ni kunvenas en la neŭtrala Svislando. Libera komerco mondvasse jam eblas, sed tio, kio necesas, liberaj homoj, homoj kiuj mem decidas kien iri, daŭre estas koncepto kiun politikistoj ne kapablas digesti.

Mi venis al ĉi tiu urbo, al nia Kongreso kun multaj demandoj. Maldormajn noktojn mi povas havi kiam mi pensas pri la estonto de SAT. Kvankam mi estas pozitiva homo, mi faras al mi zorgojn pri la nuna tendenco, de homoj kiuj ne plu volas agadi en sociala rondo. Mi havas la impreson ke precipe junuloj ne plu volas pagi, eĉ minimuman sumon, por esti membroj de u ajn asocio.

Ŝajnas al mi, ke multaj homoj nun kontentas pri interreta kontakto kun nekonata persono kaj ke la fizika kontakto perdas sian valoron por ili? Espereble mi eraras.

Mi faras al mi demandon kiamaniere konvinki ĉi tiujn “novajn esperantistojn”, la verdajn interretulojn pri la valoroj de sociokultura asocio, pri agado ĉe la flanko de progresemluloj, ne nur sidante antaŭ ekrano, sed rekte en batalo por pli bona mondo.

Mi faras al mi demandon, kie troviĝas, en la nuna epoko, la batalloko de SAT? Ĉu nia agadkampo daŭre estas la sama kiel antaŭ 82 jaroj, kiam la k-do fondis nian asocion?

Mi havas multajn demandojn al kiuj mi esperas havi respondon dum la nuna Kongreso de SAT. Mi do venis por aŭskulti, por kompari ideojn kaj tezojn kiujn vi havas, kun miaj ideoj.

Certe dum kunveno de LEA-komitato oni decidis ĉu al SAT-ligitaj asocioj povas doni liberan esprimon al faŝismaj organizoj kaj personoj, aŭ ĉu tia ago sufiĉas por ke tia asocio ne plu povu resti en SAT-familio?

Mi ne havas nur demandojn, mi havas ankaŭ la certecojn, ke mi kunvenas kun ge-kdoj kiuj venis ĉi tien kun pozitiva mentaleco. Mi estas certa ke mi partoprenas kongreson en kiu ĉiuj volas trovi manieron por plifortigi nian asocion, ne nur laŭ kvalito sed ankaŭ laŭ kvanto.



*Prezidanto de la Plenum-Komitato, k-do Jakvo Schram malfermas la 76-an SAT-Kongreson.*

Jes, estas fakto ke ni bezonas parte la kvanton por la agrableco de la enspezo, sed aliflanke kaj precipe ankaŭ pro la fakto ke, kiam ni estas multnombraj niaj voĉoj ankaŭ sonas pli laŭte kiam ni devas protesti kontraŭ malhumaneco, kontraŭ milito, kontraŭ subpremo, kontraŭ malhumiligo. Do kvanto estas duflanka gajno.

Kvaliton SAT havas, sed tio estas memevidenta. Homoj, kiuj ne kontentas pri simplaj vortoj kiel “saluton” kaj “ĝis la revido”, sed kiuj ekstudas lingvon tiel ke ili kapablu diskuti per ĝi, eĉ pri seriozaj socialaj konceptoj, devas havi certan seriozecon, devas esti konsciaj batalantoj por homaj kaj socialaj rajtoj. Homoj kiuj pretas peni por ekstudi demokratan senpotencan lingvon, kun la celo uzadi ĝin en la batalo por la rajtoj de la laborista klaso, kontraŭ la demagogaj retorikoj kiuj nur servas la grandan kapitalon, estas, ja devas esti, grupo de altkvalitaj humanistoj. Por fini, ĉar mi ne volas foruzi vian liberan tempon mi rapide volas klarigi ion.

Pluraj homoj sendis al mi interretajn mesaĝojn en kiuj ili esprimis siajn zorgojn pri onidiroj ke SAT intencas kunfandiĝi kun aliaj grupoj. Strange estas ke la mesaĝo venis de membroj de SAT. Mi ne komprenas ilin. Ĉu ne jam k-do Lanti diris “Ni fosas nian propran sulkon”?

Nu karaj geomikoj efektive ni daŭre fosas nian propran sulkon. SAT ne estas varo kiu povas esti vendata. Pro nia statuto kaj strukturo ni devas resti sendependaj. Evidente ni povas kaj volas kunlabori kun aliaj asocioj. Evidente ni povas agadi